# Eŭropa Bulteno

**Somero 2009, № 7-8 (84-85)**

***Karaj legantoj,***
***Jen la somera numero de Eŭropa bulteno. En ĝi vi povas trovi informojn pri somera agado de EEU.***
***La sekva numero estos plejparte dediĉita al infanoj kaj junuloj, pro tio mi invitas gepatrojn, instruistojn ka organizantojn de aranĝoj dediĉitaj al novaj generacioj, sendi informojn pri eventoj en kiuj vi ĉeestis aŭ ĉeestos en proksima tempo. Mi atendas ankaŭ la fotomaterialon. Certe, ĉiuj aliaj informoj estas bonvenaj.***



***Artikolojn por la sekva numero bonvolu sendi al vesna.obradovic@gmail.com ĝis la 25-a de septembro.***
***Fruktodonan skribadon kaj agrablan legadon,***

***Vesna Obradović***

## PRILINGVAJ ARANĜOJ ORGANIZATAJ DE EŬROPAJ INSTANCOJ

Dum septembro okazos pluraj aranĝoj organizataj en Eŭropo pri lingvaj demandoj. Mi mencias nur kelkajn:
1. En Stokholmo okazis la 8-an de septembro konferenco Travidebleco kaj klareco de jura lingvaĵo en EU organizata de Sveda registaro kiel prezidanto de Eŭropa Konsilio. Ni esperas ke iu sveda aŭ alilanda esperantisto partoprenis.
2. Eŭropa Asocio de Civitanaj Asocioj organizas la 22-an de septembro kunvenon je la temo " Tutviva lernado - ŝlosilo por Eŭropa aktiva civitaneco" en Bruselo, kie partoprenos reprezentantoj de EEU
3. Ĉirkaŭ la 10-a de septembro Hohan Lundberg ĉeestis en kafo-renkontiĝo kun Komisionano Orban (supre la artikolo pri tio).
4. Organizata de Alp-Adria Universitato en Klagenfurt sub la titolo 4-a simpozio pri Eŭropaj Aferoj: Kio okazos? - Analizoj kaj vizioj por Eŭropo okazos aranĝo de la 25-a ĝis la 26-a de septembro, kie partoprenos Z. Tišljar.

**Zlatko Tišljar**

# 16 TAGA FESTIVALO DE LINGVOJ KAJ KULTUROJ



Maribora (Slovenio) Festivalo Lent estas tradicia aranĝo kiu prezentas diversspecajn kulturajn eventojn. Ĝi daŭras 16 tagojn. Ĉi-jare ĝi okazis inter la 26-a de junio kaj la 11-a de julio. Proksimume 4000 diversaj koncertoj, teatraĵoj, dancvesperoj, infanaj programoj estis montritaj tra la tuta urbo. Multaj kaŝitaj kortoj ekbrilis en solena etoso aperante kiel perfekta scenejo por somernoktaj spektakloj. Urbo, kiu kutime somere dormetas, ekvivis, ekkantis, ekdancis… Fajroverkoj ornamis la ĉielon okaze de ĝia komenco kaj fino.

Inter multaj interesaĵoj, en parto de programo okazinta en urba parko, estis ankaŭ Festivalo de lingvoj kaj kulturoj. Organizis ĝin Instituto por eduko, klerigo kaj kulturo el Maribor kune kun Esperanto-societo. Sub ombro de grandega ruĝa fagarbo, en sufiĉe granda tendo ni realigis ampksan programon. Ĉiutage, inter la 16-a kaj la 20-a horo estis prezentitaj diversaj landoj, lingvoj, kulturoj. Multaj esperantistoj partoprenis prezentante sian landon, parolante tra skajpo kun hazardaj promenantoj aŭ intencaj vizitantoj de nia tendo. Ĉiutage Zlatko Tišljar gvidis unuhoran kurson de Esperanto. Kadre de la Festivalo de lingvoj kaj kulturoj en parka scenejo prezentis sin Attila Schimmer kantante en dekdu diversaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Multaj aliaj programeroj estis ligitaj al la taga programo de nia agado.



Samtempe en Muzeo de popola liberigo estis ekspozicio, kiu en du grandaj salonoj, montris librojn (abc-libroj, vortaroj, lernolibroj por lernado de fremdaj lingvoj, manlibroj diversfakaj, infana literaturo) kaj aliajn aĵojn ligitajn al koncerna lando, lingvo kaj kulturo. Estis prezentitaj entute 52 lingvoj de la tuta mondo. Preparante la ekspozicion ni kunlaboris kun ambasadoj, bibliotekoj, librovendejoj, lernejoj… La ĉefa spaco estis dediĉita al Esperanto. Enirante la unuan salonon videblis granda verda flago sub kiu estis montritaj unua libro pri Esperanto kaj aliaj interesaj libro pri kaj en Esperanto. La ekspozicio estis abunde vizitita. Al la vizitantoj ni proponis ankaŭ multajn materialojn pri Esperanto kaj aliaj lingvoj. En la muzeo ni preparis ankaŭ kinofilmojn por infanoj kie ni prezentis multajn animitajn filmojn el diversaj landoj.

Maribora tagĵurnalo Večer raportis pri la evento, dediĉante al la Festivalo de lingvoj kaj kulturoj duonan paĝon.

Por la sekva jaro ni jam interkonsentis kun la direktorino de la Muzeo de popola liberigo, ke la tuta programo estos organizita en la muzeo. Bedaŭrinde ankaŭ la pluvsezono dum la tempo de la Festivalo Lent estas jam tradicia. Por plibonigi nian projekton ni bezonas pli sekan spacon. Ni invitas vin partopreni nian aranĝon en la jaro 2010.

**Vesna Obradović**

# KUNVENO KUN ORBAN

(http://ec.europa.eu/commission_barroso/orban/index_en.htm):



En la kunveno ĉeestis 40-50 homoj. Orban mallonge parolis komence, poste sekvis demandoj/komentoj kiujn Orban respondis, Ĉio en la angla krom unu demando/respondo en la franca. Pluraj demandoj estis interesaj kaj ĝenerale estis agrabla etoso dum la kunveno. Ulla Luin (eksa ĝen. sekretario de UEA) sufiĉe frue ricevis la vorton kaj mallonge prezentis sin kaj la Eo-movadon petante ke la EU-instancoj donu pli da atento al Eo kaj ĝia movado. Dum ŝi parolis, Orban komencis folium iun gazeton kiun li poste levis citante iun francan filozofon kiu skribis ke unulingvismo facile sekvigas unupensismon. Li daŭrigis klarigante ke por EU plej gravas la lingva diverseco kaj ke ĝi ne povas/volas subteni unulingvismon. Ulla tuj aldonis ke tute same la Eo-movado faras kaj aldonis ke ŝiaimprese la malgrandaj lingvoj nun iĝas pli kaj pli malgrandaj/malfortaj kaj la grandaj pli potencaj. Orban konsentis ke mondskale tiel estas, sed ke en EU la minoritataj lingvoj lastatempe ricevis pli da subteno kaj atento. Sekvis multaj aliaj temoj sed la respondoj estis iom similaj: EU-instancoj ne povas decidi pri naciaj/lokaj aferoj sed nur doni rekomendojn. EU tre subtenas lingvan diversecon sed aliflanke ne estas kontraŭ la angla. Kiam mi havis ŝancon ion diri mi ne levis Eon denove, Orban jam sufiĉe klare fermis tiun pordon, sed mi demandis pri

1) kio okazos pri la Maalouf-raporto
2) kiun nivelon oni celas dirante ke ĉiuj lernu du fremdajn lingvojn
3) Ĉu eblas daŭre proponi ideon por onta libro de EU pri plej bonaj spertoj pri lingvolernado/instruado (best practices).

Orban klarigis ke la raporto enhavas ĉefe viziojn por la estonceto kaj ne estas politika dokumento sed ke li ĝojas pri ĝia bona disvastiĝo kaj la intereso pri ĝi. Li ankaŭ diris ke PAL (Personal Adoptive Language) ne estas realisma afero nun, sed tamen tre interesa ideo/propono. Pri lingvoniveloj li komentis ke tio dependas de la individuo mem, por kelkaj sufiĉas/gravas legado, por aliaj facilaj dialogoj ktp. Plej interese por mi estis ke daŭre eblas proponi ideon por la libro pri lingvolernado/instruado. Post la kunsido mi iris al li kaj petis klarigon kiel plej bone sendi ideon kaj ricevis lian kontaktkarton kun instigo sendi proponon al liaj kolegoj kiuj poste traktos la mesaĝon. (multaj homoj volis atingi lin kaj ankaŭ ĵurnalistoj, do mi en tiu situacio ne sentis min komforta ekklarigi pri la springbord-projekto nek doni al li iun paperon pri ĝi.) Eble vi scias pri tiu libro de EU pri lingvolernado/instruado kaj ĉu iu jam proponis la springbord-projekton por ĝi? Se ne, mi vere rekomendas fari provon prezenti ĝin en bona maniero. Ekz se Sean povus renkonti Orban aŭ iun el liaj kolegoj por priparoli la ideon kaj transdoni dokumentojn pri ĝi. Ev. ankaŭ E@I kaj ILEI povus kune proponi artikolon pri reta lernado uzante edukado.net kaj lernu.net kiel sukcesajn ekzemplojn. Krome ŝajnas ke ni E-istoj daŭre estas iom miskomprenataj de EU-moŝtoj. Kiu diris ke Eo volas unulingvismon? Ja estas tute male.. Aŭ ili ne bone aŭskultas aŭ ili iel volas miskompreni la Eo-movadon por havi pretekston ne rilati kun ĝi? Eble indus havi kampanjon en Eŭropo pri "Esperanto - bona bazo por lerni kaj konatiĝi kun aliaj lingvoj kaj kulturoj"..

**Hokan Lundberg**

# SOMERA UNIVERSITATO DE EDE



« Somera Universitato » de EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto) okazis en kastelo Gresillon (Grezijono), de la 29a ĝis la 30 de aŭgusto 2009. Tiu politika « partio » prezentas nur kandidatojn dum balotoj por Eŭropa Parlamento, ĉiun kvinan jaron.
Proksimume tridek homoj el Francio partoprenis.. Ili analizis rezulton de pasinta baloto (junio 2009), kiam francoj kaj germanoj povis voĉdoni por EDE-kandidatoj. Tio utilis por jam prepari venontan kampanjon de 2014. Ĉiuj partoprenantoj konsentis: EDE estu ligita al Eŭropo, al demokratio kaj al problemoj de lingvaj rajtoj.
Dum venontaj jaroj, membroj de EDE povos partopreni en naciaj aŭ regionaj balotoj. Se traktato de Lisbono validiĝos, EDE proponos (se eble) referendumon pri komuna balot-leĝo pri Eŭropa Parlamento en tuta Eŭropo, laŭ germana modelo, kun aliaj malgrandaj partioj, kaj eble, referendumon pri instruado de Esperanto en Eŭropa Unio. Ankaŭ necesos plifirmigi la movadon, per lokaj grupoj kie EDE jam ekzistas kaj per novaj naciaj asocioj en landoj kie EDE ĝis nun ne ekzistas.
Por tio multe da laboro atendas volontulojn: starigi teamojn por komuniki, varbi, reklami, organizi festojn...

**Pierre Dieumegard**

# ESPERANTISTA PROJEKTO INSTRUOS LA SLOVAKAN

(teksto kun aprobo de la redakcio prenita de Libera folio)

La populara multlingva retejo Lernu.net ekhavos slovakan ĝemelon. Dum Lernu.net instruas Esperanton, la nova retejo celas instrui la slovakan al alilingvanoj. Malantaŭ la projekto staras la esperantista organizaĵo E@I. La eduka agentejo de EU ĵus donis al la projekto subvencion de 256.000 eŭroj. Laŭ Peter Baláž de E@I, la projekto helpos plu fortigi la organizaĵon, kaj ĝi povos utili ankaŭ al esperantistoj. Esperanto kredeble estos la laborlingvo de la teamo, kiu ellaboros la novan retejon, kaj la retejo havos ankaŭ esperantlingvan version. EU-subvencion ricevis ankaŭ du pliaj projektoj, en kiuj E@I partoprenos kiel partnero.
Esperantista projekto instruos la slovakan
La projekto por rete instrui la slovakan havas la provizoran nomon Slovak Online, kaj la tuta projekto-propono estis bazita je spertoj de la lingvolerna retejo www.lernu.net – kiu ŝajnas unika ne nur en Esperantujo, sed ankaŭ ekster ĝi. Tiun retejon ellaboris kaj prizorgas ĝuste la teamo de E@I.
- Ene de lernu-teamo estis jam delonge plano provi utiligi sistemon kaj spertojn por instrui aliajn, naciajn lingvojn. Nun hazarde ni trafis bonan tempon kaj sukcesis pri la ekstera subteno por tia realigo, klarigas Peter Baláž, kunordiganto de E@I.

La ricevita subvencio de 256.000 eŭroj laŭplane kovros 75 procentojn de la dujara projekto. La ceterajn 25 procentojn kunfinancas la partneraj organizaĵoj.
Kiam EACEA, la eduka agentejo de Eŭropa Unio, informis pri la akcepto de la subvencipeto, ĝi sendis al E@I ankaŭ rimarkojn pri la monpeto, kie oni plurfoje mencias la ekzistantan Esperanto-retejon lernu.net kaj ĝian profesiecon.
- La projekto estis taksata kiel vere altkvalita, kio nur pravigis la decidon dungi profesian firmaon, kiu pretigis ĝin. Ni volus ankaŭ danki al s-ro Tamás Slezák, kiu afable pruntedonis monon al E@I por pagi la monpet-verkantojn, diras Peter Baláž
Fakte E@I sendis du monpetojn, por la sukcesinta Slovak Online, kaj por Tajpu! – multlingva retejo por instrui ĝustan 10-fingran tajpadon. La tajpoprojekto tamen ne ricevis subvencion de EU.
La slovaka lingvolerna retejo estas peresperanta, sed ne poresperanta projekto. Tamen ĝi povos multe utili por la organizaĵo E@I, kaj por la esperantistoj, opinias Peter Baláž.
- La retejo por lerni la slovakan devas dekomence esti en kelkaj lingvoj: angla, germana, pola kaj litova. Kompreneble, ĉar la teamo de E@I estas E-istoj, eblos lerni la slovakan ankaŭ pere de Esperanto, kiu verŝajne estos eĉ la laborlingvo de la projekto, kaj ĝi certe aperos kiel elektebla lingvo por la estonta retejo.
En la projekto partoprenas ses organizaĵoj el kvin landoj - Slovakio, Germanio, Britio, Pollando kaj Litovio. La ricevita subvencio laŭ Peter Baláž donos al E@I bonan ŝancon plu kreski kaj okupiĝi pri edukaj kaj interretaj projektoj en pli vasta skalo.
Multe da utilo de tiu ĉi projekto laŭ li havos ankaŭ lernu.net kaj eventuale aliaj Esperantaj retejoj, ĉar teknikojn uzotajn por nova retejo, oni povos utiligi sekve ankaŭ por la Esperantaj projektoj de E@I. Ankaŭ en aliaj manieroj la projekto povus utili al poresperanta agado.
Peter Baláž- Ni nun havas bonan eblon prezentiĝi ankaŭ ekster Esperanta mondo, kio povas ankaŭ utili al la poresperanta agado de E@I. Ekzemple unu el gravaj partneroj de la projekto estos la fondaĵo de la unua damo de Slovakio, edzino de slovaka prezidento, s-ino Gašparovičová. La fondaĵo ŝatis la projekton kaj ambicie pretis helpi pri la informado kaj publikaj rilatoj, post ĝia lanĉo. Tiel okazos pluraj personaj interparoloj je la plej alta nivelo.
Aldone la projekto povas montri, ke Esperanto ne celas forpuŝi aliajn lingvojn, sed male povas ludi gravan rolon por ilia dis vastigo. E@I jam pripensas provi similan monpeton estonte por aliaj lingvoj kiel ekzemple la pola, ĉeĥa kaj simile.
Krom la propra projekto por instrui la slovakan lingvon, por kiu E@I mem petis subvencion, efektive E@I ene de unu monato ricevis konfirmon ankaŭ pri la aljuĝo de EU-subvencio al du pliaj projektoj, en kiuj ĝi partoprenas kiel partnero.
La unua rekte celas poresperantan agadon - nome instrui instruantojn por "Universitatoj de tria aĝo" en Pollando. Tiun ĉi projekton estris PEA, ĉefe ĝia prezidantino Halina Komar kaj Interkultura Centro Herzberg. La dua projekto celas kreon de plurlingva retejo rilata al la hispana lingvo kaj kulturo. Por ĝi petis subvencion altlernejo en Varsovio, kaj E@I respondecos pri la slovaka versio de tiu retejo.
Peter Baláž tre kontentas pri la sukcesoj.
- Tiu ĉi somero estas vere fruktodona je pozitivaj novaĵoj por E@I. Montriĝis, ke ja eblas sukcesi ĉe grandaj eŭropaj monpetoj, se oni proponas ion interesan kaj utilan. Jen, eble instigo por pluaj provoj en simila direkto? Eble fine venos tempo, kiam esperantistoj lernos pli utiligi la eksterajn monfontojn por sia agado?

**Peter Baláž**

# 26-a DE SEPTEMBRO: EŬROPA TAGO DE LINGVOJ

Karaj esperantistoj!



La 26-a de septembro jam fariĝis tradicio. Mi kredas ke por esperantistoj ĝi devus esti aparta festo, similgrava kiel Zamenhoftago kaj ke ni devus je ĉiuj niveloj de lokaj E-grupoj, regionaj organizoj, landaj asocioj kaj internaciaj E-organizoj pretigi programojn en kaj ĉirkaŭ tiu tago.
La estraro de Eŭropa Esperanto-Unio decidis ĉi-jare sendi en tiu tago leteron al ĉiuj Eŭropaj parlamentanoj en kiu ni sciigas ilin pri agado de esperantistoj kaj ni sendos la leteron al ĉiu parlamentano en la nacia lingvo de lia ŝtato. Krome, la sekretario de EEU faros prelegon en neesperantista simpozio pri estonto de EU en Klagenfurt (Aŭstrio), organizata de Alp-Adria Universitato en Klagenfurt sub la titolo 4-a simpozio pri Eŭropaj Aferoj: Kio okazos? - Analizoj kaj vizioj por Eŭropo.
Tamen ni invitas vin ĉiujn entrepreni ion: organizi prelegon pri lingvaj demandoj, lanĉi iun libron, okazigi ĵurnalistan konferencon, prezenti iun filmon... aŭ simple prezentu agadon de Esperantistoj por defendi lingvan diversecon.
Pri kiu ajn el tiuj aranĝoj kiuj estas dediĉitaj al la Tago de la Lingvoj bonvolu laŭeble urĝe informi apartan paĝaron de Konsilio de Eŭropo en kiu oni aperigas kalendaron de tiuj aranĝoj. Vi mem povas enskribi datumojn pri via aranĝo en la kalendaron. Ĝi grave levos la prestiĝon de Esperanto en neesperantista mondo.

**Zlatko Tišljar**

# OMAĜE AL ISTVAN SZERDAHELYI

La 30-an de aŭgusto okazis en Domo de Nacioj en Budapeŝto okaze de la 85-a naskiĝdatreveno de fama pedagogo kaj sciencisto, kiu fondis la katedron por studi Esperanton ĉe ELTE universitato en Budapeŝto en la jaro 1966, Istvan Szerdahelyi. D-rino Ilona Koutny, nuna estrino de Esperanto-studoj en Poznana universitato, redaktis memorlibron "Abundaj fontoj" en kiu kontribuis dudeko da sciencistoj per siaj artikoloj diversmaniere rilatantaj al la laborkampoj de Szerdahely. Pluraj el ili prelegis. Ĉeestis kvindeko da gravaj hungaraj esperantistoj kaj la familio de Istvan Szerdahely. Inter ili Blazio Wacha, Palma Csiszar kaj Thierry Salomon, Ludoviko Molnar, sinjoro Dudich, Nanovfszky, Anjo Amika (kiu kantis), Anna Beszenyi, Arpad Ratkai... Ĉar d-ro Szerdahely mortis en 1987, ne ekzistis filmita materialo pri li. Tamen, mi trovis en mia arkivo vidbendan materialon filmitan en 1986 en Zagrebo kiam d-ro Szerdahelyi partoprenis en simpozio pri paco (tiu jaro estis de UNO proklamita Jaro de la Paco). Kaj tiam ni filmis iom da materialo dum la simpozio sed ankaŭ kelkajn intervjuojn kun E-famuloj. Kruno Tišljar kunmetis elektitan filmmaterialon kaj la intervjuojn kun I.Szerdahelyi, Tibor Sekelj, Claude Piron kaj Flora Szabo sur DVD-diskon kaj mi prezentis ĝin nun okaze de la festo.

**Zlatko Tišljar**

# SOMERA ESPERANTO-STUDADO DENOVE SUKCESA



SES 2009, aŭ „Somera Esperanto-Studado“ okazis inter la 10-a kaj la 18-a de julio 2009 en urbeto Modra, Slovakio. Ĉeestis ĝin 90 homoj el 23 landoj.
Jam duan fojon dum SES okazis ankaŭ la lernu!-renkontiĝo (renkontiĝo de uzantoj de retejo www.lernu.net).
La aranĝo efektive estas 8-taga somera E-lernejo, dum kiu oni povas en 26-hora kurso plibonigi sian E-on en ĉiuj niveloj. Instruado okazis ĉiutage antaŭtagmeze, en kvar niveloj, ekde komencantoj, ĝis plej altaj progresintoj. Internacia teamo de spertaj instruistoj prizorgis diligente siajn grupojn. Granda danko apartenas al: Stano Marček (SK) - komencantoj, Dalia Pileckiene (LT) – komencintoj, Petra Smideliusz (HU) – progesantoj, Márta Kovács (HU) – progresintoj.
Specifeco de la aranĝo estis la fakto, ke proksimume duono de alvenintoj estas homoj, por kiuj SES estis entute unua E-aranĝo. Ĉefe tio estas pro la fakto, ke plejmulto de partoprenintoj estas „virtualaj E-istoj“, t.e. homoj, kiuj lernas Esperanton ĉefe pere de lernu.net, kaj kutime ankaŭ uzas ĝin nur interrete. Sed SES pruvis, ke eblas venigi tiajn homojn al „reala“ E-aranĝo kaj eĉ pli – ke eblas kaj indas „enmovadigi“ la lernu-uzantojn.
Ĝuste la enmovadigo de la partoprenintoj de SES estas grava tasko – ofte gravas la unua kontakto kun la E-movado, por ke oni decidu, ĉu la lingvo internacia kaj ĝiaj kulturo kaj movado indas je plua persisto.
Posttagmezaj kaj vesperaj programeroj – kiel jam kutimas– estis buntaj kaj diversspecaj: prelegoj, ekskursoj, manlaboroj, diskutrondoj, tabloludoj, sportoj, diversaj kursoj, koncertoj. Muziko abundis ĉi-jare: slovakaj popol-kantoj en Esperanto (far popolgrupo de s-ro Sarnovský), barda koncerto de EEU-estrarano Georgo Handzlik, repa koncerto de Tone el Brazilo, muzikalaj kantoj de Atilla Schimmer el Vieno, Internacia vespero kun pluraj kantaj elpaŝoj.
La aranĝon kunorganizis E@I kaj SKEJ, signife helpis ankoraŭ kelkaj slovakaj E-istoj. Ĉiuj helpantoj meritas grandan dankon.
Pri la aranĝo kaj pri Esperanto aperis pozitiva raporto en ĉefaj televidaj novaĵoj en televido TV Markíza en Slovakio, samkiel en tutŝtata radio-elsendo „Slovensko 1“.
Venontjaran SES 2010 oni planas okazigi tuj komence de julio, inter la 2-a kaj 10-a de julio – ĉifoje en urbo Piešťany, nur 80km de la ĉefurbo Bratislava.

**Peter Baláž**

**Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**
**Finredaktita: la 15-an de septembro 2009.**
**Redaktorino: Vesna Obradović.**
En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Hokan Lundberg, Peter Baláž, Pierre Dieumegard, Vesna Obradović
**Kontakto:** vesna.obradovic@gmail.com
**Retpaĝo:** http://www.lingvo.org, www.eŭropo.eŭ

Education and Culture DG
'Europe for Citizens' Programme

**Kun-financata de Eŭropa Unio kadre de la programo "Eŭropo por Civitanoj"2007 – 2013.**